



INFORMIO

Numero 10/eo

Junio 2008

KONTRAŬ LA PINTKUNVENO DE LA G-8

Estas nekutime ke esperantistaj organizaĵoj, kaj des malpli la ligitaj al la transformigaj movadoj, aperu en la grandaj amaskomunikiloj. Sed tio nun okazis danke al la streboj de la Libera Esperanto-Asocio en Hokkajdo, kaj ilia batalado kontraŭ la pintkonferenco de la G-8 kiu okazos en tiu japana insulo de la 7-a ĝis la 9-a de julio.

G-8: tiu ĉi senkolora nomo, laŭ la burokrateca merkatisma uzo de sigloj por kaŝi nepurajn entojn, estas la nomo prenita por la kunvenoj de la estroj de la pli industriigitaj landoj, la heredanto de la okcidentkapitalistaj kunvenoj, kun la aldono de Rusio. La kunveno en kiu oni decidas la tendencojn de la kapitalismo en la sekvaj jaroj, super la decido de la popoloj, aŭ de la internaciaj organizaĵoj sub pli demokratia kontrolo.

La lastaj jaroj tiuj Pintkunvenoj estis akre kontestitaj, kaj precipe en 2007 la lukto kontraŭ la kunveno en Germanio altiris la atenton de la tuta mondo. Ankaŭ ĉijare en Japanio estas planataj diversaj kontraŭstaroj, eĉ se la japana registaro elektis relative izolitan lokon por la konferenco, pretendante ŝirmi ĝin de la popola kontrolo.



En tiu kunteksto, la agado de la esperantista asocio LEAH vekis zorgon de la japana polico. La unua incidento okazis kiam Esperanto-amiko Martin Krämer trovis ke lia intenco eniri Japanion por ĉeesti la unuajn protestojn estis malpermesita de la aŭtoritatoj, kiuj resendis lin, sub aĉaj kondiĉoj, ekster la landlimon. Tiu incidento kaj la sekvaj agadoj de esperantistaj medio vekis la atenton unue de la brita gazeto *New Statesman*, kaj poste de la germana *Der Spiegel*.

Laŭ ambaŭ revuoj, la japanaj sekurservoj timas la iniciatojn de la esperantista grupo por kunigi aktivulojn de diversaj landoj, des pli ke antaŭ kelkaj monatoj grupo de koreaj kamaradoj vojaĝis al Japanio por kunordigi la penojn. Krome, ili timas la uzon de lingvo por ili ne konata, kiu povu roli kiel kaŝlingvo inter protestantoj.

Dum malamikoj puŝas tutmondiĝon, pligraviĝas ke ni batalas kunŝultriĝante kaj sentas rekte internacian solidarecon. Ni por tio serĉas ĉiun eblecon malgraŭ manko de mono kaj malfacilaĵo de komunikado.

Pliajn informojn legu en: <http://lea-h.sakura.ne.jp/>
<http://solidareco.cafe24.com/>

PORPACA AGADO

Kiel apogo al la *Internacia Ago-Reto pri Etarmiloj* (IANSA), ni esperantigis ilian sinprezenton.

Kio estas IANSA?

La **Internacia Ago-Reto pri Etarmiloj** (*LAREA* aŭ *LANSA*) estas la tutmonda movado kontraŭ perpafila perforto - reto de 700 organizoj de la civila socio laboranta en 100 landoj por halti la multiĝon kaj misuzon de etarmiloj kaj malpezaj bataliloj. IANSA strebas fari homojn pli sekuraj rilate al perpafila perforto, per la serĉado de pli forta reguligo pri pafiloj en socio kaj pli bonaj kontroloj pri eksportoj de armiloj. Ĝi reprezentas la voĉojn de la civila socio sur la internacia scenejo, ekzemple en la UN procezo pri etarmiloj, kaj ĉerpas el la praktika sperto de siaj membroj por kampanji favore al politikoj kiu protektos homan sekurecon.

IANSA konsistas el larĝa gamo de organizoj zorgantaj pri etarmiloj, inkluzivante politik-evoluigajn organizojn, naciajn grupojn por la reguligo de pafiloj, virinajn grupojn, esplor-institutojn, humanitarajn organizojn, religiajn grupojn, postvivintojn, organizojn por homaj rajtoj kaj komunuma agado.


Kion faras IANSA?

IANSA celas redukti etarmilan perforton:

- levante la konscion inter politikfarantoj, la publiko kaj la amaskomunikiloj pri la tutmonda minaco al homaj rajtoj kaj homa sekureco kiun kaŭzas etarmiloj
- antaŭenigante la penojn de la civila socio por malhelpi armilan multiĝon kaj armitan perforton per politika evoluado, publika edukado kaj esploro
- subtenante kunlaboran lobiadon, kaj kreante forumon por ke Neregistaraj Organizoj kundividu spertojn kaj disvolvu trejnadon
- havigante al la civila socio manierojn partopreni en tutmondaj kaj regionaj procezoj
- antaŭenigante la voĉojn de postvivintoj, solidarece kun ili kaj iliaj familioj



AGADOJ KONTRAŬ GRAPOLBOMBOJ



Kiel ni informis en pasintaj Informiloj, SAT estas membro de la Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj aŭ *grapobomboj*, CMC. En la lastaj semajnoj okazis finfine bona novaĵo rilate al tiu kampanjo: internacia Konferenco en Dublino malpermesis la fabrikadon kaj vendadon de tiaj terurigaj bomboj.

Mankas la subskribo de la ĉefaj landoj fabrikantaj tiujn mortigajn aparatojn: Usono, Ĉinio, Israelo, Rusio, Hindio. Sed ĝi estas paŝo antaŭen, kiun eĉ tiuj ĉi landoj ne povos ne rimarki.

LA VENONTA SAT-KONGRESO

La Kongreso de SAT en 2008 okazos en Bulgario, en la konata turisma loko Kazanlako, Valo de Rozoj, inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto.

HISTORIO

Jaume Viladoms estis malnova pioniro de la kataluna laborista movado, kiu agadis por Esperanto antaŭ kaj post la hispana interna milito. Li estis ano de *Sennacieca Asocio Tutmonda* en la tridekaj jaroj, kaj ankaŭ pli poste. Lia politika kaj socia aktivado estis ampleksa kaj plurflanka. Membro de diversaj asocioj kaj partioj, unue de la duontrockista POUM, poste de la socialistaj grupoj kiuj kondukis al la renaskiĝo de la Kataluna Socialista Partio en la lastaj jaroj de la diktaturo.

Unu grava agado okupis lin dum lia tuta vivo: la instruado de la laboristoj. Li fondis instruajn iniciatojn, li instruis eĉ dum sia enkarcerigo. La akademio Delta, nun lernejo “*Jaume Viladoms*” estas la plej daŭra restaĵo de liaj klopodoj.


Dum jaro 2008, lia naskiĝurbo Sabadell omaĝas lian figuron. En aprilo okazis publika prezentado en urbteatro, kaj en septembro ekspozicio memorigos lin kaj liajn atingojn.

» Ni eldonis kiel Dokumento 07 la tekston pri Esperanto, aperantan en la katalogo de la ekspozicio pri la “Liberecana memoro”, kiu ankoraŭ nunjare vizitas la ĉefajn urbojn de Hispanio. Ĝin pretigis nia veterana amiko Eduardo Vivancos, kaj ĝi estas ankaŭ legebla en nia retpaĝaro, en la adreso: <http://www.nodo50.org/esperanto/memorialibertaria.htm>

» En retpaĝo dediĉita al la hispana milito en Malago oni kreis *retroblogon*, tio estas, falsan taglibron, kiu simulas la skribadon de tia blogo dum la milito, kaze ke la reto tiam ekzistus, kaj oni aldonis ankaŭ versiojn de eblaj radioelsendoj, en tiu epoko. SATeH estis invitita simuli iaman radioelsendon dulingvan, en la hispana kaj en Esperanto, kaj tiucele legigis aŭtentan tiaman tekston el la revuo “Popola Fronto”. La rezulto estas aŭskultebla ĉe: <http://www.laprimeraelnelpeligrodelalibertad.com/?p=497>



KULTURO



Alberto Fernández estas konata movadano, kun belga civitaneco kaj hispana origino, kies artikolon “La ideologia stumblo inter socialismo kaj (la) internacia lingvo” ni publikigis kiel *Dokumento 01* de nia serio. Kun longa historio en la laborista movado, li sin dediĉas nun inter alie al la tradukado esperanten de artikoloj de la pacista belga revuo “Vrede”, kaj al la verkado de aliaj sociaj, sciencaj kaj beletraj tekstoj.

Kelkaj el ili – inter kiuj kelkaj unue publikigitaj de nia asocio – aperis nun libroforme, sub la titolo “*Kalejdoskopio rememoro*”, eldonita de Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

Nova reta felietono

Ekde januaro aperas en *SAT-kulturo* reta felietono. Faciligas la aperon la konstruo de la teksto tute en korespondaj leteroj. Ĉiun semajnfinojn do prezentigas la verko po unu-du leteroj. La legonto trovas nur avantaĝojn: konservo de daŭra intereso per tiu felietona sinsekvo, apero de mallonga legotaĵo post la semajno de laboro en la du tagoj de malstreĉiĝo, neneceso de elspezo por librokosto, iom-post-ioma alkutimiĝo al subtila esprimo de sentoj en nia lingvo. Legu ĉe: <http://www.satesperanto.org/-Nova-cxiusemajna-felietono-.html>

ALIAJ INICIATOJ

» La retejo de la venonta Eŭropa Socia Forumo, kiu okazos en Malmö (Svedio) de la 17-a ĝis la 21-a de septembro, ankaŭ havas version en Esperanto: <http://www.esf2008.org/eo/>.

» Inter la 14-a kaj la 16-a de marto okazis en Benicàssim (Valencilando) internaciista ibera renkontiĝo. Distro, kulturo kaj socia aktivado, kun Esperanto kiel komuna lingvo.

» Dum la monato marto estis organizita ekspozicio pri Esperanto en Komerca Centro de Madrido, okaze de la Internacia Jaro de la Lingvoj, aprobita de Unuiĝintaj Nacioj por 2008.

» La 7-an de marto, okazis en Nilvango prelego antaŭ franca publiko pri la laborista esperanto-movado kaj la partopreno de esperantistoj dum la Hispana Intercivitana Milito.

» La SAT-Amikara kongreso okazis en Antonio inter la 22a kaj 25a de marto 2008. La 2-a kongreso de Arci Esperanto okazis en Assago (Milano) la 3an de majo 2008.

» Pluraj intervjuoj faritaj dum la pasinta SAT-kongreso, kaj legaĵoj el diversaj artikoloj de “Sennaciulo” estas aŭskulteblaj ĉe la esperanta elsendo de radio ZZZ, el Melburno. Arĥivoj estas konsulteblaj ĉe <http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

» Recenzo pri la libro “Mortopuno”, pri kiu ni informis en pasinta *Informilo*, aperis en la plurlingva retejo “esplorforumo pri anarĥiismo”, <http://raforum.info/>, kiu celas kunigi multlingvan materialon pri anarĥiismo. Bonvena estus helpo por pliampleksigi la esperantan sektion. Ja el pli ol 4000 artikoloj en deko da lingvoj estas nur... 10 en Esperanto (kaj kelkaj pliaj pri ĝi en diversaj lingvoj).

La fototeko pri socia movado, <http://www.phototheque.org>, estas retejo kiu senpage disponigas fotojn pri sociaj eventoj (ĝis nun 7681 bildoj en 493 kategorioj), por aktivulaj eldonoj, retaj aŭ paperaj. Jam plurfoje SAT profitis el ĝi, kaj reciproke ĝi enhavas kelkajn fotojn kun esperantaj tolpaneloj, glumarkoj ktp. Momente temas ĉefe pri franca, eĉ grandparte parizregiona iniciato, kaj la internacia sekcio estas sufiĉe malplena, do estus certe tre bona reklamo, se subite alfluus multaj fotoj tra esperanta kanalo.

Ĝisdatigita paĝo kun resumo kaj ligoj al ĉiuj projektoj de SAT, kiuj bezonas kunlaborantojn, estas konsultebla ĉe: <http://www.satesperanto.org/-Kion-fari-.html>

NI POVAS HAVIGI AL VI:

Krom la jam antaŭe anoncitaj libroj, diskoj kaj filmoj, ni nun povas havigi al vi algluaĵojn, poŝtkartojn kaj T-ĉemizojn. Petu detalojn al nia adreso, aŭ vizitu nian katalogon en:

<http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm>

ĜENERALA ASEMBLEO DE SAT-en-Hispanio

Oni kunvokas Ĝeneralan Asembleon de SATeH por venonta 5-a de julio, en la sidejo de la Hispana Esperanto-Kongreso en Cuenca (Kvenko).

Dum la Kunveno estos renovigita la Estraro.

Por kontakti kun ni:

SAT-en-Hispanio (SATeH)

Poŝtokesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

esperanto@nodo50.org

<http://www.nodo50.org/esperanto>